

La Riverego

Kebekia esperantista bulteno

<i>La Eta Princo en Turkio</i>	2	Reen al fontoj	11
MEKARO 2011	5	Reveno al Trivero	17
Pasporta Servo 2.0	6	Kiel traduki ?	18
Reage kaj responde al F. Gauthier ...	7	Volontula laboro	19
Unuiĝintaj Nacioj kaj Esperanto	9	Arto en traduko	23



***Avec l'espéranto
en Turquie !***

***Kun Esperanto
en Turkio !***



La Eta Princo en Turkio

Suzano Roy

Voici un exemple concret du fait que l'espéranto peut servir de pont entre les cultures : l'auteure a visité la Turquie, où, grâce à l'espéranto, elle a reçu un accueil chaleureux, étant même invitée à loger chez des espérantistes. En signe de reconnaissance, elle a apporté comme cadeau un exemplaire du Petit Prince.

Antaŭ 35 jaroj, studante en ontaria universitato, mi konatiĝis kun turkoj, geamikoj de mia tiama koramiko. Ili estis ĝojaj, amikemaj homoj kaj ilia lando ŝajnis al mi tiel malproksima, plej antikva kaj ekzotika... Mi pensis : **lam** mi iros.

Pasis la jaroj, mi perdis kontakton kun tiuj amikoj, sed neniam forlasis la ideon viziti Turkion. Sed kiel ? Mia koramiko tute ne entuziasmiĝis (li memoris la filmon *Midnight Express* !) kaj mi ne kuraĝis iri sola en tiel fremdan landon. Ni certe ne volis fari grupan, organizitan vojaĝon (fakte ni estas tre malbonaj turistoj, kiuj kutime ne tre interesiĝas pri turistaj *vidindaĵoj* kaj neniam faras tiel, kiel la aliaj...). Do mi lernis la lingvon per libro (*Le turc sans peine* !) kaj daŭre legis kaj revadis pri tiu lando.



Kiam mi eklernis Esperanton kaj eksciis pri Pasporta Servo, mi tuj serĉis en la libreto : neniun adreson en Turkio ! Neniun esperantiston en tiu granda lando, ĉu eblas ? Bonŝance, kelkajn monatojn poste, dum ARE, mi aŭdis pri Mezorianta Kongreso, okazinta en Turkio. Dank' al usona amikino, mi ricevis gravegan ŝlosilon : retadreson de esperantisto.

Ĉar tio estas la magio de Esperanto. Vi povas skribi al nekonato, ien ajn en la mondo, komencante per : « Kara samideano, mi ŝatus viziti vian landon. Ĉu eble... » kaj pordoj malfermiĝas ! Post

kelkaj retaj komunikoj, mi havis afablegan inviton, eĉ loĝejon en Istanbul. Mi sukcesis konvinki mian koramikon, ke, helpe de tiu turka *amiko* (ankoraŭ ne vidita), la vojaĝo estos multe pli facila kaj sekura. Li decidis veni. Koni **iun** ŝanĝas **ĉion** !

Murat, mia turka kontakto, estas simpatia mezaĝa viro, licea instruisto, delonge aktiva esperantisto. Li instruas ne nur Ĥemion, sed ankaŭ Esperanton. Mi vere scivolis pri liaj instrumentadoj (ĉar la malfacilaĵoj de Esperanto devas esti malsimilaj por turkoj...), sed ne eblis partopreni kurson tie, ĉar tiam liaj lernantoj vojaĝis al Serbio, gvidataj de tiu kara Murat. Do estis 13 turkoj, farante ne nur lingvan kurson, ne nur turismumadon, sed fakte plenumante pacan mision. En Eŭropo, landlimoj estas pli proksimaj, sed kultura diverseco estas granda, kaj militoj estas ankoraŭ freŝaj memoroj... Tie Esperanto prenas sian plenan sencon. Dank' al homoj, kiel mia amiko Murat, gejunuloj el neamikaj landoj spertas interkonatiĝon. Ne estas pli bona antidoto kontraŭ heredaj malamoj.



Bonŝance mi renkontis kelkajn el tiuj belaj junuloj. Mi fiere kunportis, kiel donaceton, ekzempleron de nia nove eldonita *Eta Princo*. Estis interesege pasigi momenton tradukante kaj komparante la turkan kaj esperantan versiojn. La turka estas mirinda lingvo... sed tio estos temo por alia artikolo !

Istanbulo estas ĉe la limo inter Eŭropo kaj Azio. Tio estas ne nur geografio, oni vere vidas kaj spertas tiun ligan. Por ni, tio estis unua vizito en Azio kaj en islama lando. Estas vere strange, kiel ĉio (vestaĵoj, preĝejoj, muziko, manĝaĵo, ktp.), **ĉio** estas samtempe tre fremda kaj tre proksima, kiel jam konata. Ekzemple, tradiciemaj virinoj (ilia kvanto varias laŭ diversaj kvartaloj) vestas sin kiel monaĥinoj de tiam, kiam mi estis juna. La moskeoj kaj religiaj aferoj okupas tie pli-malpli la saman spacon, kiel la tiama katolika



eklezio en Kebekio : ne facilas paroli kontraŭ ili...
La muziko estas tre, tre turka : estas kvazaŭ ĉiam la sama kanzono ; sed ni aŭdis tre interesan *turkigitan* version de la fama *Take Five*, de Brubeck. Strange, mi diras... Kaj, amuze, ni trovis en spicovendejo, inter multege da ekzotikaĵoj, tre kebekiajn... oksikokojn ! (Oui, oui, des canneberges de chez nous !)

Post Istanbul, ni trajnis ĝis la mezo de la lando, mirinda Kapadocio. Ĝi estas eta regiono, sed ega natura trezoro. Tion oni devas vidi... Fotoj ne donas ĝustan ideon. Tie ni luis aŭton kaj feliĉege esploris vojetojn (kelkfoje timigajn) kaj vilaĝojn. Ĉie ni trovis naturajn (sed ne arkitekturajn) belaĵojn, interesajn historiaĵojn (nekredeble malnovajn), milionojn da floroj kaj eksterordinare amikemajn homojn. Tiaj afableco kaj malfermo, neatenditaj, plej mirigis nin. Estas tio, kion ni plej daŭre memoros.

Nova aŭtomata tradukilo el la franca al Esperanto

Aperis aŭtomata tradukilo el la franca al Esperanto, libere uzebla ĉe la adreso <http://apertium.saluton.dk>

La tradukilo estas bazita sur Apertium — rime-daro por konstrui aŭtomatajn tradukilojn, per kiu jam funkcias tradukiloj el la kataluna, hispana kaj angla al Esperanto kaj de Esperanto al la angla. Ĉiujn eblas uzi ĉe la supra adreso. Entute per Apertium funkcias ĝis nun 42 tradukiloj.

Apertium estas programaro malfermfonta kaj libera, same uzanta liberajn datumarojn. Ekzemple por ĉi tiu nova tradukilo el la franca al Esperanto estas ĉefe uzita kiel baza dulingva vortaro la Reta Vortaro, pro tio, ke ĝi estas libere uzebla kaj havas franclingvajn ekvivalentojn preskaŭ por ĉiu vorto. La tutan fontokodon kaj lingvan datumaron de Apertium kaj de ties tradukiloj eblas elŝuti el <http://sourceforge.net/projects/apertium/>

Interesiĝantoj iel kontribui ne hezitu aliĝi al la retlisto http://groups.google.com/group/apertium_eo aŭ eventuale kontaktu Hèctor Alòs i Font : [hectoralos\(ĉe\)gmail.com](mailto:hectoralos(ĉe)gmail.com)

[fonto: Ret-Info <http://www.eventoj.hu>]

Dum la 8-a MEKARO en Kingstono ni...



Pasporta Servo 2.0 : aliĝu interrete !

Jenja Amis

Le Pasporta Servo, service d'hébergement gratuit à la disposition des espérantophones, créé en 1974, est maintenant en ligne. Inscription et participation sont tout à fait gratuites !

Se vi ankoraŭ ne estas membro de Pasporta Servo (PS), mi elkore invitas vin aliĝi ! Kvankam oni jam kompilis la adresojn por la papera eldono de la libro por tiu ĉi jaro, jen bona novaĵo : ekde nun, neniam tro malfruas por aliĝi ! Ekde la momento de via aliĝo, via nomo aperos en la interreto kiel gastiganto kaj (se vi volas daŭre esti gastiganto) en la venonta papera eldono.

Kiel vi certe scias, Pasporta Servo estas adresaro de esperantistoj el la tuta mondo, kiuj proponas al uzantoj de tiu listo gastigi en iliaj hejmoj senpage. PS aperas ekde 1974, kaj ekde antaŭ kelkaj jaroj ĝi ekzistas en la reto, sub la nomo Pasporta Servo 2.0. Dank' al la nova reta sistemo, la redaktado estas dividita inter pluraj personoj, kaj ekde antaŭnelonge mi estas la nova landa organizanto por Kanado. Koran dankon al la antaŭa landa organizanto, Normando Fleury, kiu plenumis tiun ĉi taskon dum 25 jaroj !

La retpaĝo www.pasportaservo.org proponas multajn eblojn, kiuj ne ekzistis antaŭe : rekta aliĝo en la retejo, rapida ŝanĝo de informoj, kontaktiĝo per la retpaĝo,

retaj mapoj kaj multaj aliaj. La papera eldono daŭre estas mendebla de la UEA-libroservo kaj de aliaj libroservoj. Atenton ! La posedo de la

papera libro ne plu estas kondiĉo por esti gastiganto — por tion fari, nun necesas esti membro de la reta sistemo (ĉu gastiganto aŭ ne). Tiel nun gastigantoj antaŭ la alveno de la gastoj jam povas kontroli ties profilon en la retejo, kaj informiĝi pri la gastoj. Se vi ne povas gastigi, vi tamen povas proponi ĉiĉeronadon en via urbo, kaj, kompreneble, mem esti gastiganto.

Vizitu la retejon de PS, <http://www.pasportaservo.org> por lerni pli kaj aliĝi, trovi kunvojaĝantojn, ekscii pri la E-novaĵoj kaj konatiĝi kun samideanoj !



Reage kaj responde al Francisko Gauthier

Normando Fleury

Une réponse à la lettre de démission publiée dans notre dernier numéro



Mi ĝojas, ke Francisko esprimis sin en *La Riverego*. Tio pravas, ke ni estas malfermitaj al ĉies opinioj, kaj li parte pravas, ke ESK dormetas momente. Iam mi estis junulo. Iam mi alvenis al la movado kun ideoj, kaj fakte mi pensas, ke mi kaŭzis

ŝokon, kaj ke pluraj esperantistoj ne sekvis min en la nove fondita kebekia movado, ĉar ili konsideris ĝin tro politika. Mi klarigu al Francisko, ke antaŭ la 80-aj jaroj ne estis aparta Esperanto-movado en Kebekio : estis nur tiu de la Kanada Esperanto-Asocio kaj lokaj kluboj. Kun grupo da kebekianoj el diversaj anguloj en Kebekio, ni decidis krei ESKon, kaj pluraj tiam aktivaj esperantistoj en Kebekio ne favoris tion. Ili simple neniam aliĝis al ESK kaj nur foje venis, kiam ni organizis ion gravan, kiel la Kanadan Kongreson de Esperanto, en 1987.

Bedaŭrinde, ni ne sukcesis venigi ilin al la kebekia Esperanto-movado, sed, malgraŭ tio, mi plu aktivis favore al ESK kaj al KEA. Mi multfoje klopodis klarigi,

kial ni kreis ESK-on, kaj ankoraŭ nun mi devas fari tion, ĉar daŭre tra Kanado kelkaj esperantistoj pensas, ke ESK malhelpas al KEA, ĉar ĝi dividas la fortojn en la E-movado. Kial mi skribas pri tio ? Simple por ke vi komprenu, ke nova ideo bezonas tempon por progresi, kaj ke neniam ĉiuj akceptos ĝin. Vidu kiel Esperanto ne sukcesis multe disvastiĝi tra la mondo eĉ post pli ol jarcento, malgraŭ tio, ke avantaĝoj de komuna internacia lingvo estas facile videblaj.

**Nova ideo bezonas
tempon por progresi,
kaj neniam ĉiuj
akceptos ĝin...**

Mi venu al via artikolo. Mi organizas renkontiĝojn (lokajn, provincajn, landajn, regionajn, internaciajn) de 30 jaroj. Mi ne diras tion por laŭdi min, sed nur por

ke vi komprenu. Mi ĉeestis dekojn kaj dekojn da renkontiĝoj. Ofte (eĉ tro ofte) mi sidis kaj aŭdis pri lingvaj debatoj ; kial ne aldoni iŝi (*elles*) aŭ se estas ino por bovino kial ne iro por bov-viro ? Lingvaj debatoj estas senfinaj debatoj, laŭ mi. La monataj kunvenoj en Montrealo estas malfermitaj al ĉiuj temoj kaj debatoj. ARE prezentas prelegojn, debatojn, kunsidojn, kursojn, ktp. Vi estas bonvena malfermi debaton laŭ via plaĉo. Kial vi ne venas ?

Kiam mi kreis MEKARO-n, mi volis krei ion novan. Eĉ se mi ne plu estas junulo, ankaŭ mi pensas, ke necesas ŝanĝoj, necesas provi ion novan. MEKARO estas turisma, kultura, amikeca semajnfino en Esperanto. Ĝi NE estas kongreso aŭ kunsida semajnfino. La celo estas viziti muzeojn, urbon, kune manĝi, amuziĝi en Esperanto. Eble mi estas egoisma, ĉar mi kreis semajnfino laŭ mia plaĉo, sed mi pensas, ke ne nur mi ŝatas tion. Fakte, la Tririvera MEKARO [en 2010] estis inter la plej bonaj. Mi scias (kaj kulpas), ke mi petis, ke vi forprenu la debaton de la programo. La ĉefa problemo estis, ke via programo estis tro plena. Ne eblas por 50 personoj manĝi en restoracio ene de unu horo. Tio postulas minimume du horojn. Mi bremsis min multe por lasi vin organizi MEKARO-n laŭ via plaĉo. Sed foje necesas certigi, ke ĉio iru glate, kaj ke la programo povu realiĝi. Vi ŝajnas surpriziĝi, ke la partoprenantoj plene kontentas pri MEKARO ; nu, mi fieras, ĉar tio signifas, ke esperantistoj ne nur volas kunsidi kaj aŭdi prelegojn, sed ili ankaŭ volas sperti ion novan uzante Esperanton.

Mi konkludu dirante, ke novuloj ofte alvenas kun ideo, kiun la estraro de ESK jam provis antaŭe, sensukcese. Ekzemple, ne utilas kontakti ĵurnaliston por peti, ke ili skribu ion pri Esperanto. Esperanto ne estas novaĵo, laŭ ili, sed ideo, kiu ne funkciis. Mi ne diras, ke ni neniam devas provi, sed ke ni devas havi

ion gravan por prezenti. Loke estas pli facile aperigi ion ol en Montrealo, kie novaĵoj abundas. Certe, ESK dormetas, sed estas junuloj, kiel vi, kiuj devus transpreni ĝian gvidadon, kaj fakte mi invitas vin ne malaliĝi de ESK, sed male, eniri ĝian estraron, se vi vere volas ŝanĝi ion en la E-movado. Junuloj estas la estonteco, kaj mi esperas, ke ili kreos pli bonan kaj pli pacan mondon.

P.S. Iam necesos verki historieton de la kebekia E-movado por prezenti al novuloj ĉion, kion ni faris kaj provis dum la pasintaj 30 jaroj.

Ĝustigo :

La redakcio de *La Sago* atentigis nin pri eraro sur paĝo 25 de la pasinta *Riverego* (la informo el la reta dissendolisto de Henri Masson): tiu paĝo menciis la dokument-filmon de Dominique Gautier kaj prezentis ĝin kiel filmon en la franca. Kvankam momente ĝi ja estas tia, ĝi tamen estas esence sennacieca (la tradukoj en multajn lingvojn estos faritaj kun Esperanto kiel pontlingvo).

Unuiĝintaj Nacioj kaj Esperanto — ĉu fleginda aŭ malfleginda rilato ?

Francisko Lorrain

En réponse à un article de Francis Gauthier, l'auteur rappelle que, même si l'ONU est loin d'être parfaite, elle poursuit quand même un but similaire à celui de l'espéranto, soit une plus grande unité de l'humanité.

La Riverego de septembro 2010 (n°101) enhavis, je paĝo 2, artikolon priskribantan la rilatojn inter, unuflanke, UEA kaj, aliflanke, UN kaj Unesko (plurlingve uzata mallongigo de « United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization »). La artikolo anoncis la fondon de Esperanto por UN, organizaĵo celanta « altigi la profilon de Esperanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj » kaj, inversdirekte, « disvastigi informojn pri UN inter la esperantistoj ».

En sampaĝa opiniesprimo titolita *Kiam interesoj vendiĝas*, Francisko Gauthier malpozitive rilatigis sin al ĉio tio :

- kial esperantistoj informu aŭ eĉ nur informiĝu pri UN, dum UN neniam vere interesiĝis pri Esperanto ?
- kial UEA deziras profundigi siajn rilatojn kun UN, sed ne kun grava internacia organizaĵo kiel Amnestio Internacia ?
- cetere kial esperantistoj alianciĝu kun UN, kiu ja

potencas, sed vere agas, nur kiam tion postulas la intereso de ĝiaj plej influaj membroj, lasante aliajn situaciojn disvolviĝi sen decida interveno (ekz. en Ruando kaj Srilanko) ?



Li konkludas: « Mi ne bezonas, en la esperantista medio, esti informita pri organizaĵo kun sango sur la manoj, dankon ! »

Ja bonegaj demandoj. La kerna demando estas laŭ mi la tria. Jen kelkaj pensoj pri ĝi.

Ĉiu homa institucio, ĉu formala, ĉu malformala, estas iugrade — foje multe, foje malmulte, sed ĉiam iom — subprema, ĉar ĝi emas imponi sian leĝon en la kampo de sia agado. Tamen, en ĉiu homa socio, institucioj spontane formiĝas kaj tute ne eblas eviti ilin. Ni eĉ ne kapablus vivi sen ili : lingvo, familio, amikaro, laborejo, urbo, ktp. Ĉiu el ili, kiel ĉiu homo, iel havas « sangon sur siaj manoj », almenaŭ figurasence. Nia ĉiutaga lingvo (kiu ajn ĝi estu) estis/estas/estos iam uzata de

krimuloj, diktatoroj aŭ torturistoj ; krome, kaj en sia vortostoko kaj en sia strukturo mem, ĝi ne ĉiurilate respektas principojn de egaleco inter viroj kaj virinoj (ekzemple). Ĉu ekzistas urbo, en kiu ne okazis iam grava malrespekto de la homaj rajtoj ? Ĉu niaj manĝaĵoj, aŭtoj, komputiloj, ktp, estas produktataj de laboristoj ĉiam juste kaj humane traktataj ? Pli ĝenerale, ĉu iam ekzistis homo, kiu neniam faris la plej etan malbonaĵon ? Kompreneble, iuj havas pli da sango sur siaj manoj ol aliaj, kaj tiu diferenco gravas. Sed kio pri UN ?

UN estas ja plejparte kontrolata de kelkaj potencaj landoj, kiuj zorgege flegas siajn privilegiojn kaj interesojn, anstataŭ tiujn de la tuta homaro. Tamen, malgraŭ ĉiuj siaj difektoj, UN konsistigas unuan paŝon, agnoskinde ankoraŭ tre timidan, en la direkto de pli unuigita homaro. Ĝuste la saman direkton celas Esperanto. Jes, UN malperfektegas kaj UEA malperfektas. Sed same ĉiu el ni. Kaj verdire UN ne kompareblas kun la 3a Regno de Adolfo Hitler ! Ni nur faru, kion ni povas, por antaŭenigi pacon kaj justecon, kunlaborante kun ĉiuj institucioj, kiuj povas iom helpi tiucele — ne hezitante tamen emfazi iliajn malfortaĵojn, kiam tio necesas, kaj klopodante puŝi ilin al pli altaj celoj. Tia kunlabora agado ne plaĉos al ĉiu, kompreneble, sed ni havu respekton por tiuj, kiuj emas al ĝi.

Lernu Esperanton en Montrealo ! Apprends l'espéranto à Montréal. Gratuit !

Partoprenu la ĉeestan senpagan Esperanto- kurson en Montrealo !

Kiam : ĉiun mardon de la 19-a ĝis ĉ. 21-a.

Kie : Commensal St-Denis (1720, rue St-Denis), la suba etaĝo.

Bv. kontakti anticipe la kursgvidanton, Martin Benoit : bohemien100(ĉe)hotmail.com.

Le dictionnaire d'espéranto "PIV" sur la Toile !

Le site "Plena Ilustrita Vortaro en la reto!" informe que la somme nécessaire de 10 000 € pour permettre la mise en ligne, avec libre accès, du dictionnaire de référence d'espéranto "PIV" (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto) est enfin réunie et même dépassée.

Ce fait a une grande signification pour l'espéranto, car, ainsi, dans un avenir que nous espérons pas trop lointain, les usagers de l'espéranto et les débutants pourront consulter librement ce dictionnaire de référence de la Langue Internationale.

[dissendolisto de Henri Masson]

Reen al fontoj

Silvano La Lacerto Auclair



Deux tentatives de retour aux sources, c'est-à-dire aux racines indo-européennes d'environ toutes les langues européennes. Une est particulièrement sympathique et fonctionnelle.

Ni ĉiuj scias, ke plej multaj el la eŭropaj lingvoj devenas de la sama fonto, nome la hind-eŭropa pralingvo. Nu, same kiel iuj proponadis la latinan aŭ simpligitan latinan lingvon kiel internacian lingvon — rolo kiun ĝi neniam devus esti lasinta, ili opinias — iuj proponas, serioze, uzi rekonstruitan hind-eŭropan lingvon en tiu rolo.

Kompreneble, estas al tiu projekto pluraj kontraŭstaroj. Unue, ekzistas neniu teksto en la hind-eŭropa — skribo ekestis post ĝia dislingviĝo. La plej malnovaj skribitaj hind-eŭropaj lingvoj estas la malnova greka kaj la sanskrita. Due, mankas en ties vortaro ĉiuj *modernaj* vortoj — kaj la vorton moderna ni komprenu en tre vasta senco : en la epoko, kiam tiu lingvo estis uzata, ekzistis nek ŝtalo, nek selo por ĉevalrajdi ! Jam estas malfacile uzi la latinan por moderna parolado — romanoj konis nek pantalonon, nek poŝon, nek naztukon, laŭ fama netradukebla frazo — estus eĉ pli malfacile uzi eĉ pli malnovan lingvon.

Trie, la hind-eŭropa estas *terure* malfacila. Nomoj variaj laŭ tri genroj, tri nombroj, **ok kazoj** kaj kvar malsamaj deklinacioj ; verboj ŝanĝas la radikon, kiam oni uzas ilin en diversaj tempoj kaj aspektoj. Eĉ la prononco estas al mi stranga, kun spiraj konsonantoj. Estas eĉ strange, ke popolo entute povis paroli tian lingvon...

Kaj la proponantoj eĉ ricevis subvenciojn por irigi sian projekton ! Legu pri ĝi (en la angla — aliaj lingvoj estas maŝintradukaĉoj) ĉe <http://dnghu.org/>

Sambahsa-Mundialect

Alia projekto, tamen same bazita (parte) sur la sama pra-hind-eŭropa vortaro kaj gramatiko, ŝajnas al mi multe pli simpatia. Ĝi nomiĝas sambahsa-mundialect (*sambahsa* signifas komuna lingvo). Kreita de franco, Olivier Simon, ĝi enhavas vortojn ne nur el la hind-eŭropa pralingvo, kiel *gwive* por vivi, aŭ *kerd* por koro, sed ankaŭ de modernaj eŭropaj lingvoj, kiel *bureau*, *postamt* aŭ *change*

(=ŝanĝ[iĝ]i) aŭ eĉ el la araba, kiel fauran, tuj, aŭ la ĉina, kiel *xiongbu*, por brusto.

La rezulto ja aperas ia miksaĵo, sed ne tro, laŭ mi. Pli okulfrapa, almenaŭ por esperantisto, estas la ortografio, kiu pli-malpli respektas nacilingvajn uzojn de okcidenteŭropaj lingvoj. Tiel, on retrovas vortojn kiel *bureau*, prononcata kiel en la franca, aŭ *change*, prononcata /ĉanĝ/, aŭ *theatre*, prononcata /θeatr/, aŭ *geologia*, prononcata /dʒeolodʒja/, aŭ *serieus*, prononcata /serjøs/, kaj tiel plu. La reguloj pri prononco kaj akcento estas plene regulaj (sed skribi aŭdatan vorton povus montriĝi malpli facile, laŭ mi), kvankam ili tamen ampleksas eble kiel la tuto de la Esperanta gramatiko. Ekzemple, u estas prononcata /u/, krom se estas e en la du postaj literoj, en kiu kazo ĝi iĝas /y/ (la franca u), kaj krom en eu, /ø/, eau, /o:/ aŭ ou, /u:/... Nu, mi forgesis la grupon qu, kiu estas kŭ antaŭ a kaj o kaj k antaŭ i kaj e... Ĉu vi vidas? Krome, kelkaj sonoj kaj songrupoj povus esti malfacile prononceblaj al kelkaj popoloj, kiel /ø/, /y/, /θ/, /x/, /ç/, gv, ktp.

Fakte, sambahsa-mundialect verŝajne estas la sola konstruita lingvo celanta iĝi helplingvo, kiu



Filmeto kun la subtitoloj en la sambahsa-mundialect en Youtube

ne asertas sian simplecon kaj regulecon kiel plej gravan avantaĝon. En tiu kampo, ĝi prezentas sin pli kiel naturan lingvon, parte rekonstruitan, kvankam ĝi ja estas multe pli simpla kaj regula ol iu ajn natura lingvo, kompreneble.

Gramatiko

Ankaŭ la gramatiko tre similas tiun de natura lingvo, kaj grandparte spegulas tiun de la antikva pra-hind-eŭropa lingvo — tamen simpligita. Ekzemple, la substantivoj kaj adjektivoj ne havas deklinacion... devigan, mi volas diri. Se iu deziras, eblas, en iuj cirkonstancoj (kiuj rilatas al la loko de la akcento), aldoni deklinaciajn finaĵojn... por doni antikvecan aspekton, por ebligi pli densan esprimon, por teni klarecon, se oni sekvas ne regulan vort-ordon. Genitivo estas ankaŭ pli-malpli regule uzata (kun finaĵo s en la singulara). Sed ja estas devigaj deklinacioj ĉe la difinaj artikoloj, ĉe la montraj kaj rilataj pronomoj kaj adjektivoj kaj ĉe la personaj pronomoj — kaj, strange, la pronomoj de la tria persono (li, ŝi, ĝi kaj ili) havas la *samajn formojn* kiel la artikoloj (la).

Tiuj deklinacioj rememorigis min pri miaj kursoj pri la latino en mezlernejo — kio estas iel timiga

ĉe helplingvo, ĉu ne ? Ili tamen estas pli simplaj, kvankam estas por lerni... 32 formoj (ne ĉiuj malsamaj, sed tamen...) Jen la formoj de la artikoloj / difinaj artikoloj :

Singularaj formoj:

Kazo / Genro	Vira	Ina	Neŭtra	Ne-determinita
Nominativo	is	ia	id	el
Akuzativo	iom	iam	id	el
Dativo	ay	ei	al	
Genitivo	ios	ias	ios	al

Pluralaj formoj

Kazo / Genro	Vira	Ina	Neŭtra	Ne-determinita
Nominativo	ies	ias	ia	i
Akuzativo	iens	ians	ia	i
Dativo	iabs	ibs	im	
Genitivo	iom	iam	ios	al

Sed kio estas tiu kvara genro, la nedeterminita ? Ĝi estas la nura noveco ekster la hind-eŭropa gramatiko. Nu, la neŭtra genro povas uziĝi nur por objektoj kaj bestoj. Vira kaj ina genroj uziĝas por homoj (kaj bestoj), kies sekson oni konas. Tiu kvara

genro uziĝas por homoj (aŭ bestoj, se iu volas), kies sekso estas nekonata aŭ ne grava, en cirkonstancoj, kie naturaj hind-eŭropaj lingvoj devas uzi la viran genron. Nu, se iu venas kaj frapas ĉe via pordo, vi povos demandi *quel gwehmt¹ ?*, kiu venas ?, sen precizigo pri la sekso. En la latina, ekzemple, oni devis tiam uzi la viran genron : *quis venit ?*. Estas kompreneble, ke uziĝas en la pluralo preskaŭ nur la nedeterminita kaj neŭtra genroj...

Kaj ne timu : eĉ la aŭtoro de la lingvo konfesas, ke li foje devas kontroli tiujn formojn. Nu, memoru, ke li ne vere *kreis* tiujn, sed *rekreis* ilin el la malnovaj hind-eŭropaj lingvoj.

Verboj

Verboj ankaŭ povas prezenti defion al lernantoj. Korekto : verboj ja prezentas defion. Kompreneble, vi eble jam divenis : ĉiu persono havas sian propran finaĵon. La verbo *gwehm*, ekzemple (sambahsajn verbojn oni prezentas per siaj radikoj ; la infinitivo de *gwehm* estas *gwehme*) havas en prezenco la formojn *gwehmo*, *gwehms*, *gwehmt*, *gwehmmos*, *gwehmte*, *gwehment* (aŭ *gwehme*). Eblas aldoni la subjektojn por emfazo : *io* (aŭ *ego*, por eĉ plia emfazo — *mi* estas ĉiam grava vorto en ĉiu lingvo...), *tu*, *is*, *ia*, *id* aŭ *el*, *wey*, *yu* kaj, fine, *ies*, *ias*, *ia* aŭ *i*. Ekzistas tri neregulaj verboj : *havi*, *esti* kaj *koni*. Tamen, ne kredis ke ĉio estas tiel simpla. Iuj

verboj havas sian unuan personon kun m, aŭ eĉ sen iu finaĵo. Verboj kun nazala infikso sekvas apartajn regulojn : la verbo *suppressem* (forigi ; france *supprimer*) iĝas *suppremo*...

Krom la prezenco, ekzistas pluraj aliaj tempoj kaj modoj : futuro (kun sufikso aŭ helpverbo), kondicionalo, imperativo, eĉ subjunktivo. Tamen, la dua baza tempo en la sambahsa-mundialect estas la paseo. Nu, mi skribis, ke ĉiuj verboj (krom tri) estas regulaj, sed ni ne diris *kiom multajn regulojn* ili devas sekvi...

Nu, krom apartaj ses finaĵoj por la paseo (la verbo *gwiv*, vivi, ekzemple iĝas *gwivim*, *gwivst(a)*, *gwivit*, *gwivam*, *gwivat*, *gwiveer* : latinlernintoj rekonas pli-malpli la finaĵojn de la perfekta tempo, de kiu devenas la franca *passé simple*), ĉe pluraj verboj eĉ la radiko ŝanĝiĝas. Verboj kun iuj vokaloj aŭ konsonantoj devas ŝanĝi ilin. Bonŝance, laŭ precizaj reguloj. Ekzemple, la verbo *publie* (publikigi) iĝas *publicim* ; la verbo *vid* iĝas *visim* ; la verbo *tehm* (tranĉi) iĝas *tohmim* ; la verbo *scrib* iĝas *scripsim* ; la

verbo *aur* (aŭdi) iĝas *ieurim*...

Kial ĉio ĉi ? Unue, por sekvi la verajn lingvojn. Vi certe rekonis, ke tiuj vokalŝanĝiĝoj similas tiujn de la angla : *tehm/tohm*, kiel *get/got* ; ke la ŝanĝo de konsonanto ankaŭ ekzistas en la franca : *publie/publicim*, kiel *publier/publication*. Krome, la paseaj participoj povas finiĝi aŭ kun -n (kiel en iuj fortaj anglaj verboj, aŭ ankaŭ en la germana) aŭ kun -t (kiel en la latina — la franca perdis ĝin — en la itala, la hispana (t → d) aŭ... Esperanto). Cetere, tio evitas la embarasan devon elekti inter diversaj formoj. Kial en Esperanto oni diras vidi anstataŭ *vizi*-(sed

Nombroj en sambahsa-mundialect

La nombrosistemo en tiu lingvo estas iomete pli malfacila ol tiu de Esperanto. Jen ili de unu ĝis dek : *oin*, *dwo*, *tri*, *quar*, *penk(we)*, *six*, *sept(a)*, *oct(o)*, *nev*, *dec*. Vi rimarkas, ke foje ekzistas elektebleco inter du formoj. De dekunu ĝis deknaŭ, oni uzas sufikson : *oindem*, *dwodem*, *tridem*, *quardem*, *penkdem*, *sixdem*, *septdem*, *octdem*, *nevdem*. Tiu sufikso ne portas akcenton kaj estas prononcata /dəm/. Dudek, tridek ktp estas *dwogim* /dwodʒim/, *trigim*, ktp.

ja ekzistas *vizio*) ? Kial publikigi kaj ne *publii*? Sambahsa-mundialect povis alpreni en sin ambaŭ formojn laŭ precizaj reguloj.

Due, por pli densa esprimo. Tiel, multaj verboj en la prezenco bezonas nur unu silabon, dum en Esperanto

oni bezonas almenaŭ tri. Mi estas tradukiĝas al *som*. Kaj eĉ en la paseo, oni bezonas nur du silabojn : *mi rigardis* estas *spohcim*.

Tamen... la aŭtoro devis eldoni tabelon kun pli ol 250 verbomodeloj... kaj aldoni la paseajn bazajn formojn en vortaron... Sambahsa ne estas simpla lingvo, sed simpligita formo de natura lingvaro.

Ekzempla teksteto

Pos long jars passit un prince iter unte id land ed is ieur un geronto narre od apter id akenhag, eet un castell quer un princesse uns daumost beauteit, namen ia Bell Aiwoswohpa, eeswehpneut pon ja cent jars, ed con iam swohp is roy, ia rayn ed id hol curt.

Post longaj jaroj denove pasis princo tra la lando kaj li aŭdis maljunulon rakonti, ke malantaŭ la dorna heĝo estas* kastelo, kie princino de mirinda beleco, nomata la dormanta belulino, dormadas* jam de cent jaroj, kaj kun ŝi dormas* la reĝo, la reĝino kaj la tuta kortego.

Prononco : pos long jars pasit un prints itər unt id land ed is jør un dzeronto nar od aptər id akenhag, eet un kastel ker un printses uns dawmost bo:tejt, namən ja bel aiwoswo:pa, eəswe:pnøt pon ʒa tsent jars, ed kon jam swo:p is roj, ja rain ed id hol kurt.

* En paseaj formoj en la originala sambahsa teksto.

Vort-trezoro

La vort-trezoro de sambahsa-mundialect estas... kiel ni diru ? bunta. D-ro Simon importis tre multajn vortojn el pluraj lingvogrupoj, kreante pli ol dekmil vortojn plus neenkalkulitaj derivitaj vortoj. Por arbaro, ekzemple, estas la tri bazaj vortoj : *forest* (/forəst/), *sylve* (/sylv/) kaj *lays* (/lajs/), sed krome ekzistas la vortoj *yurlin* (pluvarbaro), *orlays* (praarbaro), *bosc*² (bosko), *ghiri*³ (montara arbaro), *mischko*⁴ (alta arbaro), *perkuin* (miksita arbaro), *pusinos*⁵ (konifer-arbaro, tajgo). *Dreu* estas ligno, kaj *dru*, arbo. Nu, kvankam ja ekzistas vortkumetaĵoj en sambahsa, la aŭtoro tre libere pruntas el aliaj lingvoj. Se vorto ekzistas en pluraj eŭropaj lingvoj, aŭ — eble nur en la franca kaj la angla, aŭ se vorto ekzistas en pluraj lingvogrupoj, ĝi preskaŭ aŭtomate estas bonvena en la lingvo.

Kaj derivado en sambahsa ja ekzistas, sed tute ne estas reguligita. Fakte, la vortoj deriviĝas laŭ sia devenlingvo. Ekzemple, kutima sufikso por anto/isto estas –er (sed la sama ankaŭ uziĝas por formi komparativojn : *lehgv* → *lehgver* : malpeza, pli malpeza), sed arabdevenaj vortoj uzas la arabdevenan prefikson *mu-*. Tiel, el la vorto *safer*, kiu signifas vojaĝo aŭ vojaĝi, formiĝas la vorto *mussafer*, vojaĝanto.

Alia tipe sambahsa deriva sistemo estas ŝanĝo de vokalo aŭ konsonanto. Tiel, el *long*, longa, oni formas *longe*, longeco ; el *deub*, profunda, *dube* ; el *slab*, malforta, *sliebe*⁶.

Konkludo

Tiu artikolo estas nur treege rapida superflugo de la lingvo sambahsa-mundialect, kies fundamento estas tre riĉa. Kvankam malpli ol kvin homoj nun parolas ĝin (iu el Hindio eklernis ĝin tute sendepende...), mi trovas ĝin tre simpatia kaj altkvalita projekto. Kial oni lernu ĝin ? Eble nur por ĝia beleco, eble ankaŭ por akiri pli profundan kaj klaran konon de la ĝenerala funkciado de hind-eŭropaj lingvoj.

Ĉu ĝi povus iam iĝi grava lingvo ? Mi dubas : ĝia prononca, gramatika kaj vortara malfacileco igas min pensi, ke ĝi restos nur luda lingvo. Tamen, se la latina kaj franca siatempe estis gravaj lingvoj, kaj se la angla nun estas... eble facileco ne tiel gravas, kiel opinias esperantistoj.

Vikio (angla kaj franca) : <http://sambahsa.pbworks.com/>

1 : *h* post vokalo igas ĝin pli longa.

2 : la litero *c* prononciĝas *c* antaŭ *i* kaj *e* kaj *k* en aliaj lokoj.

3 : la *h* post *g* igas ĝin *g*; alie, *g* antaŭ *i* kaj *e* iĝas ĝ.


4 : la grupo *sch* prononciĝas ŝ.

5 : *s* inter du vokaloj iĝas *z*.

6 : prononcoj : /long, londʒ, døb, dyb, slab, sljeb/

Desegnofilmo en Esperanto !

Post jarlonga studado kaj laborego, Simono Keith sukcesis diplomiĝi pri klasika desegnofilmo ĉe la Vankuvera Filma Lernejo (Vancouver



Film School) en Brita Kolumbio, Kanado. Post intensa eduko pri la principoj kaj fundamentoj de movbildo, li dediĉis pli ol kvar monatojn al kreado de filmo tradicie desegnita sur papero. La rezulto estas Ĉapeloj, la unua movbilda filmo en Esperanto. Li tuj poste kreis plian filmon, Neĝuloj, en nur kelkaj semajnoj, uzante komputilajn ilojn.

Ambaŭ filmoj debutis ĉe lia diplomiĝa ceremonio, la 17-an de decembro 2010. Proksimume dek esperantistoj venis por spekti. La 10-an de februaro, Ĉapeloj gajnis premion en loka filmkonkurso en Fort Collins.

Legu Kontakton, numero 241 (2011:1), por pli da informoj. Tie eblos legi detalan intervjuon kun Simono, lukse ilustritan per skizoj, bildoj, kaj fotoj. Por spekti ambaŭ filmojn rete, bonvolu viziti la blogon de Simono: <http://chapeloj.blogspot.com>

Ĉu mankas iom da Esperanto en via somero ? Revenu al Trivero !

Suzano Roy

Vi, kiuj ne povis partopreni lastjaran MEKARO-n en nia bela urbo, jen via ŝanco.

Ni invitas vin ĉiujn, amikoj esperantistoj, la 30-an kaj 31-an de julio, por ĝoja kaj malstreĉa semajnfino.

Kelkaj povos dormi ĉe ni (ses personoj), aliaj tendumos aŭ gastos ĉe apudaj ĉarmaj hoteletoj (parolu al mi por sugestoj).

Jen proponata programo :

Sabato

14h alveno ĉe nin (541, rue Saint-François-Xavier). Babilado.

15h vizito de la plej interesa trivera muzeo (kiu bedaŭrinde estis fermita en 2010 pro renovigado), la Muzeo pri Papero (piede).

18h pretigado kaj frandado de komuna vespermanĝo.

Poste FESTO ! muziko, dancado, ludoj, ktp.

Dimanĉo

9h matenmanĝo en restoracio *Il Circo*, strato Saint-Prosper (piede).

Poste, elekto inter :

- promeno en la urbocentro antaŭ veturado al parko (25 minutoj) ; kaj
 - biciklado (kun gvidanto) ĝis Parko de la rivero Batiscan (45 km)
- 12 h** gvidata vizito de la parko (\$4), kaj poste:
- pikniko
 - marŝado, naĝado, ripozo aŭ... la Granda Aventura : obstakla vojo en la arboj, *via ferrata* kaj *tyrolienne* super la rivero (vidu prezojn ĉe la retejo de la parko).

Estos memorinda sperto !

Notu tiujn datojn kaj venu multnombro. Kunportu muzikinstrumentojn (estas piano surloke), manĝaĵojn, pilkojn,

bankostumojn, biciklojn...

Prefere (sed ne devige) anoncu vin antaŭe, por helpi rezervon de restoracio kaj de arba vojo.

Suzano la dua (rete : [roy_248\(ĉe\)hotmail.com](mailto:roy_248(ĉe)hotmail.com)

telefone : 819-840-7743)





Kiel traduki ? Comment traduit-on?

Voici une nouvelle rubrique que nous reproduisons du mensuel de SAT-Amikaro, La Sago 61. Nous les remercions et espérons que vous saurez apprécier.

Ekde nun La Riverego publikigos rubrikon prenitante el la gazeto de SAT-Amikaro La Sago 61. Ni kore dankas ilin por la permeso uzi ilian rubrikon.

La vorto *façon* havas diversajn signifojn kaj do tradukiĝas diversmaniere.

Voici une robe dont la façon est démodée. = Jen robo de eksmoda fasono.

Ce livre a une reliure façon cuir. = Tiu libro estas bindita el leda imitaĵo.

Donner une seconde façon à un champ. = Surplugi kampon.

C'est bien une idée de sa façon. = Tio ja estas ideo en lia maniero.

Il lui a joué un tour de sa façon. = Li mistifikis ŝin siamaniere.

Il y a plusieurs façons de procéder. = Estas pluraj manieroj de agado.

C'est une façon de parler. = Tio estas nur dirmaniero.

C'est une façon de voir les choses. = Tio estas nur vidmaniero.

Sa façon de parler m'agace. = Lia parolmaniero incitetas min.

Nous devons faire de cette façon. = Ni devas fari tiel.
De quelle façon espérez-vous y parvenir? = Kiel vi esperas sukcesi ?

De toute façon, vous n'y arriverez pas. = Ĉiamaniere vi ne sukcesos.

Elle s'est placée de façon à être vue. = Ŝi lokis sin tiel, ke ŝi estu vidata.

S'arranger de façon que tout soit prêt. = Elturniĝi tiel, ke ĉio estu preta.

Il veut vivre à sa façon. = Li volas vivi siamaniere.

En aucune façon. = Tute ne, neniel.

Ne faites pas tant de façons. = Ne tiel ĝenu vin.

J'accepte sans façon. = Mi akceptas senĝene.

L'achat de contrefaçons est illégal. = La aĉeto de ŝtelkopioj estas kontraŭleĝa.

Skribu al ni pri aliaj uzoj de façon !



Volontula laboro

Zdravka Metz

L'auteure fait le tour du thème du bénévolat, d'abord dans sa vie personnelle — il permet aux immigrants d'acquérir l'expérience canadienne nécessaire pour trouver du travail — puis dans l'histoire et la société actuelle. Elle termine en nous invitant à donner de notre temps.

De kiam mi venis en Kanadon, mi aŭdis pri volontula laboro. Tiam mi aktivis en Esperanto-movado kaj poste ankaŭ en porinfana asocio, virina grupo, kroata sabata lernejo, asocio de eksaj studentoj el Zagrebo, studenta asocio ĉe montreala universitato, kroat-kanada klubo...

Sed, mi ne komencis volontuli ĉi tie. Mi ja faris tion same en Kroatio, sed oni nomis tian laboron helpaj aktivecoj. Tiel mi helpis vartante etan kuzon kaj maljunan avinon, helpon mi donis al iu amiko aŭ amikino transportante, farbante, aŭskultante problemojn, helpante pri aktivecoj de loka

Esperanto-klubo aŭ estante membro de iu estraro.

Certe, multaj rekonas sin laborante en sia klubo, aŭ je provinca, landa aŭ eĉ internacia nivelo !

Tiel, vivante en Montrealo, preskaŭ ĉiutage mi havis ion por fari ekster la familio. La listo de asocioj, projektoj, eventoj, estus longa, se mi volus listigi taskojn, kiujn mi faris. Ĝi estus kvazaŭ parto de la historio de mia vivo.

Mi ĝojis pro tiu laboro, ĉar tiel mi renkontis, ekkonis pli bone kelkajn

personojn, teame laboris kun aliaj. Vere, multon mi lernis pri tiu ĉi socio, en kiu mi enmigris sen familianoj kaj sen amikoj (mi tamen havis edzon kaj lian familion kaj tio ja helpis min por pli rapida integriĝo). Tamen, kun konatoj kaj geamikoj mi pli ofte renkontiĝis, laboris, estis kaj kunĝojis pro iu sukcesa, finita — realigita projekto. Ni dankis unu la alian sciante, ke sen helpo de ĉiu el ni, la sukceso ne estus tia.

En 1999 mi eklaboris en Multetna asocio por



integriĝo de handikapitaj personoj. Mia pagata laboro fariĝis prizorgo de volontuloj de la asocio, kiu same kiel ĉiuj aliaj senprofitcelaj organizoj estis fondita kaj daŭre helpata de volontuloj.

La komencajn monatojn mi ĉeestis kursojn kaj trejnadojn trejnadojn pri la maniero administri volontulan servon. Mi lernis kiel kaj kiam varbi novajn volontulojn, kiel komuniki kun ekzistantaj volontuloj, inviti ilin por certa farenda tasko, organizi renkontiĝojn kaj festojn por ili, noti horojn por ĉiu alveno, plenigi statistikojn ĉiumonate. Tio helpas fine de la jaro por scii, dum kiom da miloj da horoj sume laboris niaj volontuloj. Tiaj horoj kaj la listo de nomoj de senpagaj helpantoj eniras la jarajn raportojn de la asocio.

Kial tio gravas ?

Nia asocio estas financata diversmaniere. Financa helpo estas bezonata por iom pli ol dek personoj, kiuj laboras donante servojn al handikapitaj enmigrintoj. Por tiuj financantoj gravas, ke laboro estu farita ankaŭ per volontuloj.



Ankaŭ donado de sango estas volontulado (foto de Kanada sango-servo)

En Kanado tre gravas tiu volontula laboro — onidire farata per amo, per koro, per volo, kutime dum propra libera tempo. Tiu volontula laboro tiom gravas, ke ĝi fariĝis tiom fama kaj estas taksata kiel vera laboro kaj sperto. Oni nomas ĝin kanada sperto.

Jes, kiel enmigrinto, kiam vi venas — kun diplomo altgrada kaj laborsperto en via lando — ĉi tie tio ne gravas. Sed volontulado — eĉ ne en via fako — estas konsiderata kiel via engaĝiĝo en la socio — do, via kanada sperto.

Jes, plej granda parto de volontuloj, kun kiuj mi laboras en la asocio estas enmigrintoj, kiuj serĉas la unuan sperton. Pro tio, post 20-hora volontula laboro, volontulo rajtas peti leteron pri sia agado ene de asocio kaj aldoni ĝin al sia dosiero de enmigrado kaj serĉado de laboro.

Volontulo ankaŭ havas siajn interesojn. Tiel laborante oni trovas konatojn kaj ĝojas, se iu demandas pri bonfarto aŭ familio, oni ofte esprimas fierecon pri sia kulturo aŭ devenlando, interŝanĝas spertojn pri loĝado, laborserĉado, babilante pri siaj timoj, zorgoj, problemoj aŭ ĝojoj pro alveno de

infano aŭ enposteniĝo.

Kial en Kanado volontulado gravas, de kio tio devenas?

Jam de la alveno de eŭropanoj, per interago kun aŭtoktonoj, ili ja lernis pri manĝeblaj plantoj kaj arbaraj fruktoj, kiel marŝi sur la neĝo, kiel konstrui kanuon kaj remi, kiel protekti sin de malvarmo kaj resanigi iun de skorbuto. Kanado estas vasta teritorio kun rigora klimato. La alvenintoj rapide komprenis ankaŭ, ke ĉiu sola ne povas sukcesi, ke ili nepre bezonas solidarecon kaj kuniĝon : fortojn, energiojn, rimedojn por forhaki arbojn, konstrui ponton, savi vunditon pro akcidento ĉe laboro aŭ natura katastrofo. Pastroj kaj monaĥinoj akompanis enmigrantojn kaj provis organizi tiun interhoman kunvivadon parolante pri helpo al sia frato.

Tra Kanado ĉie ekzistis, ofte ĉe preĝejoj, certaj centroj por doni vestaĵojn, manĝaĵojn, tranoktadon, sekurecon. Tio ekzistas same hodiaŭ. Kiam vi havas ion troan, vi donacas al preĝejo.

En 1937, en Montrealo, urbanoj organizis Centron de volontuloj de Montrealo, kiu havis saman celon

— organizi laborojn de volontuloj por plibonigi la kvaliton de la vivo de urbanoj. Tio ja estis malfacilaj jaroj de granda monda ekonomia krizo, kiam malsatis senlaboruloj kaj iliaj familioj.

Laŭ la statistiko de la Kanada federacio de voluntulsektoraj retoj, 5,6 milionoj da personoj volontulas organizite, sed pli ol 13 milionoj da homoj volontule faras ion (...)

La unua organizita publika kuirejo, kiu komencis unufoje tage disdoni varman supon, funkcias same hodiaŭ.

Fakte, la Centro evoluis kiel organizo por helpi pli efike volontuladon

en miloj da asocioj kaj helpas trovi necesajn volontulojn. Se iu asocio bezonas tradukiston, ĝi povas peti helpon, kaj la centro trovos iun profesiulon, kiu decidis eble donaci iom da tempo por neprofitcela organizo.

Hodiaŭ ekzistas neprofitcelaj organizoj kun sociaj celoj, pri sano, por defendi rajtojn, pri arto, kulturo, edukado, protekto de naturo, libertempo, sporto, aŭ en la kampo de politiko. La bezono por diversfakaj volontuloj dependas de la celoj kaj aktivecoj organizataj en certa momento. Pro tio volontuloj aperas, restas kaj foriras. Kiel rivero, fluantaj ili estas.

Laŭ la statistiko de la Kanada federacio de voluntulsektoraj retoj, 5,6 milionoj da personoj

volontulas organizite, sed pli ol 13 milionoj da homoj volontule faras ion : bakas kukon, preparas manĝon por preĝeja, kluba festo aŭ por najbaro malsana, preparas tablojn por iu solena vespermanĝo de iu asocio, akompanas najbarinon ĉe kuracisto, legas gazeton por iu blinda amiko.

Esti volontulo estas facile. Necesas tamen iom da libera tempo kaj nepre senco de respondeco rilate al la tasko, kiun oni akceptas ĉe la unua interparolado kun respondeculo pri volontuloj. Volontulo elektas tempon por veni voluntuli ĉe telefono aŭ helpi paki centojn da leteroj.

En Kanado en aprilo estis kreita tuta semajno, kiam oni sugestas publike kunigi volontulojn, danki al ĉiuj kaj doni paperajn diplomojn, metalajn aŭ vitrajn objektojn por rekoni ilian tutjaran laboron. Tiuj festoj estas ofte akompanataj per volontula muzikisto kaj nepre bona manĝo farita denove per manoj de volontuloj.

Tiam ĉiuj ĝojas, feliĉas, ĉar la vivo pli belas, kiam foje vi scias, ke iu atendas vian helpon kaj alian fojon ies helpo venos al vi.

Kiam mi komencis labori, la unua volontulino, kiun mi renkontis kaj kiu fidelas ankoraŭ, nuntempe travivas sanajn malfacilaĵojn. Nun mi vizitas ŝin por foje iom mallongigi ŝian tagon en la malsanulejo.

Jes volontulado estas ĉiam duflanka !
Se vi havas iom da tempo, anoncu vin ĉe iu organizo aŭ centro de volontuloj. La loka centro kunigos tiun proponon vian en tempo kaj tasko kun ia bezono de ia organizo. Komputiloj helpas, ke tiu aliĝo okazu pli rapide...

Volontulado estas maniero vivi.

Kaj la ĉeno de volontuloj plilongiĝas.

Partoprenu en SES !

SES, Somera Esperanto-Studado, estas ununura fizika renkontiĝo de lernu!-uzantoj jare. Ni elkore invitas vin aliĝi jam al la 4-a internacia, amuza, Esperanto-semajno - SES 2011. Ĝi okazos en urbo Nitra (Slovakio) inter la 30-a de julio kaj la 7-a de aŭgusto 2011. Ĉiujn detalojn vi trovos ĉe : <http://lernu.net/ses>. Se vi havas demandojn, ne hezitu kontakti organizantojn ĉe ses@lernu.net aŭ unuope (la kontaktojn vi trovos ĉe : http://lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/2011/kontaktoj.php). Ni esperas renkonti vin en Nitra !

Via SES-teamo



Arto en Traduko

Tony Beckwith

La angla originalo unue aperis en la aŭtuna 2010 numero de Source — reta bulteno de Literatura Fako de ATA (Amerika Tradukista Asocio) — kaj poste estis surpaperigita por la januara numero 2011 de The ATA Chronicle. La publikado de la traduko estas permesita.

*En piedpilko bone ludi ne sufiĉas :
oni devas senti la ludon profunde.*

Jules Rimet

Madrido varmis somere. Mia apartamento estis sufoka kun la fermitaj fenestroj, kaj la malfermo de ili ne multe helpis. La ĉiujara elirego de patrinoj kun infanoj estis je sia apogeo, kaj la urbo sentis sin komforte malplena pro la foresto de tiuj, kiuj retiriĝis de la varmego por pasigi kiom eble plej longan tempon en la montoj aŭ ĉe la marbordo. Por mi tio estis la plej ŝatata tempo de jaro.

Estis jam post la noktomezo, kaj mi sidis en la flaketo da lumo en la malhela gast-ĉambro sur la

tria etaĝo. La fenestro antaŭ mi estis malfermita, enkadrigante mian vidon de la nokta ĉielo pendanta super la kvietaj kvartalo. La varma aero pigre kirliĝis ĉirkaŭ mi kaj mi sidis ĉe mia skribtablo, la fingrojn sur la klavaro de mia tajpilo — verda porteblo Olivetti, mia fiero kaj ĝojo.

Kutima afero. Oni telefonis al mi posttagmeze por diri pri la projekto kun strikta limdato, kaj oni tute komprenus, se mi postulus la krompagon pro la urĝeco — ĉu mi interesiĝus ? Konsuela enlitiĝis post la vespermanĝo kaj mi restis kun Olivetti kaj la intriga malantaŭ-kulisa rakonto pri ŝere-komerco en Andaluzio, kiu inkluzivis ampleksan historion de la suda Hispanio. Bone verkita de elokventa hispano, kun tre agrablaj flueco kaj stilo, ĝi estis gracie bildeca, vera plezuro por legi. Miraklo ! Kaj longa — do, mi planis ne dormi la tutan nokton.

Frumatene Konsuela ekstaris malantaŭ mi, tenante siajn manojn sur miaj ŝultroj kaj rigardante la ĉielon. « Vi ĉiam faras tion, ricevante ion similan », ŝi diris. Mi kapjesis. « Via traduko fariĝas via querida (1), ŝi murmuris, forturnante sin, via amatino. » Ŝi pravis. La similan tradukon oni devas trakti atente. Ĝi enhavas tiom da nuancoj kaj subtilaĵoj,

ke oni devas senbarakte permesi la entiriĝon. Tio postulas cedi pormomente la tutan vivon, kaj siavice stimulas pinglopintan fokusiĝon, kiu estos riĉe rekompencata.

Vicoj de miaj pensoj estis interrompitaj, kaj mi rektiĝis streĉante en la seĝo. Mia kolo estis rigidiĝinta, ankaŭ la ŝultroj. Mi ekstaris, proksimiĝis al la fenestro kaj rigardis malsupren. Viro promenis laŭ la trotuaro de la kontraŭa stratflanko, lia ombra silueto longiĝis en lumo de la stratlanternoj. Unu mano en la poŝo, la alia svingis flanke. Atinginte la angulon, li foriĝis. Nun la strato estis senhoma kaj kvietaj, kaj strange bonvena. Mi lasis noton sur la tajpilo kaj iris malsupren. La kafejo Gijón estis proksime, kaj estos agrable promeni tien. Gijón, ŝajne, neniam estis fermata, kaj kelkaj gastoj jam sidis tie, kiam mi alvenis. Mi mendis viskion kun sodakvo en alta glaso. Mano falis sur mian ŝultron, kaj mi turnis min. « Hombre, ¡Javier! (2) » Ksaviero estas verkisto, kiu laboris ankaŭ kiel tradukisto, devigata fari tion pro cirkonstancoj. Li komprenas noktulojn de sia propra sperto kaj deziras scii, « Kiel vi fartas ? » « Ĉio bonordas, mi diris al li. La rakontado estas bona, la vortprovizo estas bona, sed mi estas penanta transdoni la tonon de la originalo ; vi ja scias, la etoson, la deĵo (3), la esencon de Andaluzio, kio estas tiom grava parto de la novelo. Ĝis nun mi ne kaptis tion. »

Ksaviero larĝe ridetis kaj mendis ankoraŭ po unu trinkaĵo. « Etoso ? Deĵo ? Esenco ? Kiaj vortoj ! Kion vi intencas fari, krei artaĵon ? »

Mi pensis momente, kirlante per la fingro la glacikubetojn en mia glaso, kaj diris : « Jes, fakte tion mi volas fari. » Ksaviero pristudis mian vizaĵon, liaj brovoj leviĝis. « Vi komprenas tion ĉi, mi daŭris. Ni tradukis divers-specajn dokumentojn ; iuj estas teruraj kaj aliaj estas pli-malpli interesaj, kelkaj estas bone verkitaj, sed tre malofte ni trovas ion nepre tradukindan. Tio ĉi estas unu el tiaj. Mi volus fari tion, kion faris la verkisto hispane. Mi volas, ke la angla versio posedu saman duende (4), la saman magian kvaliton, kiel la originalo. »

Ksaviero kapjesis kaj ekridetis. « Mi rekonas ĉi tiujn simptomojn ! Ankaŭ mi jam estis trafita, samkiel vi ĉi vespere. Laŭ mi, amiko mia, transfuzo de flamenko — jen kion vi bezonas ĉi-momente. Iru, mi regalos per trinkaĵoj en Las Brujas (5). »

Nenio estas pli animplena, ol sonoj de la flamenka kantisto, precipe kiam ĝi serpentumas ene kaj ekstere de la muziko de la flamenka gitaro por serenadi la krudan pasion de la flamenka dancisto. En la malhela, fuma lumo en Las Brujas ni sentis la pulsadon de aplaŭdantaj manoj kaj la pistadon de kalkanoj, kaj ni ekspiris iomete pli profunde. « Vi deziras priskribi la odoron kaj la esencon de

Andaluzio ? » Ksaviero kriegis. « Tio ĉi estas vera Andaluzio. » Li pravis. Flamenko venis de Nord-Afriko kun la maŭroj kaj suda Hispanio heredis la muzikon de la dezerto. Ekde tiam, la grandaj urboj Granado, Sevilo kaj Kordobo produktis generacion post generacio de flamenkaj artistoj, kiuj konservas la tradicion de siaj prapatroj, de tiuj, kiuj ekloĝis en Andaluzio. « Kaj ĝi ne estas nur tio, kion vi povas aŭdi ĉe flamenka tablo, kiel tiu ĉi, aldonis Ksaviero. Iam eksidu kviete, prefereble kun okuloj fermitaj, kaj aŭskultu — vere aŭskultu ! — al Recuerdos de la Alhambra de Tárrega (6). Vi saturiĝos per la esenco de la sudo. »

La strato estis senhoma, kiam ni lasis la trinkejon. Ni piediris tra la Calle Mayor al la Paseo kaj baldaŭ estis rigardantaj la Muzeon Prado, blanke lumanta apud la parko Retiro. « Ĉu vi deziras meti iom da arto en vian tradukon ? Ksaviero demandis, indikante per sia cigaro. Estas multe da arto tie !
— Estas domaĝo, ke ĝi estas fermita, mi diris.
— Por favor (7)! » eksputetis Ksaviero, frapante sian frunton per la libera mano. « Kiel vi intencas enmeti



arton en vian tradukon kun la simila sinteno ? Iru kun mi ! » Li prenis mian brakon kaj kondukis min trans la straton, poste li malrapide promenigis min tien kaj reen laŭ apudmuzea trotuaro, parolante serioze kaj trude. « Se vi volas, ke via traduko estu

arta kreaĵo, la arto devas esti ene de vi. Ĉio vidata kaj komprenata de vi inspiru vian vort-elekton. Pensu pri la pentraĵoj kaj la skulptaĵoj, viditaj tie ĉi. Memoru pri Goya, Velázquez, la malnovaj majstroj, ĉu vi povas imagi ilin en via menso ? Rigardu ilin pli atente. Ili ja parolas al vi ; ili volas ion diri al vi. Aŭskultu ! »

Mi faris tion, kaj mia menso estis plenigita per pensoj de formo kaj koloro, propocio kaj perspektivo. La fingroj de la statuaj manoj ekmoviĝis, kaj la siluetoj de ŝia ŝtona korpo memorigis al mi jam konatan belecon. Resono de historio eniris mian memoron, kaj la pasinteco ekpaŝis antaŭen en la lumon. Ĉio havis ritmon kaj kialon, kaj mi eksentis, kion oni penis diri. Subite mi ekvolis reveni al mia traduko. Mi diris tion al Ksaviero kaj li ekridis : « Ĉu vi aŭdis la urĝan vokon de la amatino, kiun vi ne povas ignori ? Do, tempo venis. Ni iru hejmen ! »

Ni devis trapasi nur kelkajn kvartalojn, kaj promenado estis agrabla, unu manon en la poŝo dum la alia svingis flanke. La senhomeco de la stratoj kreis senton de spaco, proponanta senfinajn eblecojn. La graciaj linioj de trafikcirklo aludis al pli frua epoko, kiam estis tempo por paŭzi kaj gustumi specifajn momentojn, vivi pli malrapide kaj en harmonio kun onia ĉirkaŭaĵo. Idilia tempo, venis al mi en la kapon, kiam ŝereo epitomigis vivmanieron.

Reen en la loĝejon, la lampo ankoraŭ brilis super la tajpilo. Mia noto restis nelegita. Mi fermis la kuirejan pordon kaj preparis iom da kafo. Poste mi staris ĉe la fenestro kaj rigardis la unuan lumon, aperantan sur la horizonto. Mia menso estis klara kaj mi sentis min ekscitita. Mi sidiĝis kaj eklaboris.

1. Amatino (hispane)
2. Ksaviero, amiko (hispane)
3. Tie ĉi —odoro, gusto (hispane)
4. Tie ĉi — mistera kaj neesprimebla ĉarmo (hispane)
5. La Sorĉistinoj (hispane)
6. Francisko Tárrega (1852–1909) — hispana gitaristo, komponisto, muzik-instruisto
7. Bonvolu (hispane)

Esperantigis membroj (7) kaj amikoj (2) de la Esperanto-Societo de Ĉikago.

Une Odysée avec Akvo

La Odiseado kun akvo estas la nomo de la spektaklo ludata ĝis 31a de decembro 2011 en la Montreala Planetario. La organizantoj alprenis la esperantan vorton « akvo » en ĝia nomo, kaj ankaŭ ne hezitas menciit tion en la retpaĝo de la spektaklo.



espace pour la vie planétarium montréal

COMMUNIQUÉ
Pour diffusion immédiate

Nouveau spectacle au Planétarium de Montréal
Une odysée avec Akvo
l'eau dans tous ses états!

Montréal, le 7 février 2011 - Le Planétarium, un Espace pour la vie présente *Une odysée avec Akvo*, le tout nouveau spectacle pour les enfants de 4 à 7 ans au Planétarium de Montréal. Toute la famille est conviée à une aventure spatiale en compagnie de la goutte d'eau, Akvo! Ce spectacle participatif mêle joyeusement rudiments d'astronomie et éveil à l'écologie grâce à une animation ludique conçue spécialement pour les tout-petits.

Un tour du système solaire
Le spectacle est mené rondement par un animateur qui interagit avec les enfants, leur parle des étoiles, du Soleil, de la Lune et des planètes. Il introduit le personnage Akvo, dont le nom signifie «eau» dans la langue espéranto! Akvo, la goutte d'eau, est curieuse de savoir si elle peut vivre ailleurs dans l'espace. Grâce à des chansons et des jeux, les

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

Tago	Dato	Horo	Loko	Temo
Vendredo	17-a de junio 2011	19 h 30	Commensal St-Denis*	
Julio-aŭgusto : neniuj kunvenoj de MEK, SED : venu al Trivero la 30-31-an de julio (pli da informoj sur p. 17)				
Vendredo	16-a de septembro 2011	19 h 30	Commensal St-Denis Jarkunsido de ESK	Notu la datŝanĝon!
Vendredo	30-a de septembro 2011	18 h 00	MEDO (Meksika vespermanĝo) alportu ion !	
Vendredo	14-a de oktobro 2011	19 h 30	Commensal St-Denis	
Vendredo	28-a de oktobro 2011	18 h 00	MEDO (Turka vespermanĝo) alportu ion !	
Vendredo	11-a de novembro 2011	18 h 00	Commensal St-Denis	
Vendredo	25-a de novembro 2011	19 h 30	MEDO (Ukraina vespermanĝo) alportu ion !	
Sabato	17-a de decembro 2011	19 h 30	Commensal	152-a datreveno de L.L. Zamenhof

Noto : manĝo je la 18-a h, babilado ekde 19 h 30

Commensal St-Denis (restaurant végétarien – rue Saint-Denis) :

1720, rue St-Denis (entre Maisonneuve et Ontario, métro "Berri-UQAM"), Montréal.

http://www.commensal.com/fr/ou/restaurants/saint_denis

MEDO (Montreala Esperanto-Domo): 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

Pliaj Esperanto-renkontiĝoj

17-20-a de junio 2011	Kongreso de Esperanto-USA	Emeryville, Kalifornio
14-21-a de julio 2011	Internacia Junulara Kongreso	Kievo, Ukrainio
23-30-a de julio 2011	Universala Kongreso de Esperanto	Kopenhago, Danio
★ 30-31-a de julio 2011	Renkontiĝo en Trivero	Trivero, Kebekio
★ 8-10-a de oktobro 2011	ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silver Bay, Nov-Jorkio
★ 19-21-a de majo 2012	9-a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kebeko, Kebekio



Esperanto-Societo Kebekia
Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafiko: Yevgeniya Amis (riverego(ĉe)esperanto.qc.ca).
Korektado kaj lingva konsilado: Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain.
Estraranoj de ESK: Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vicprezidanto), Sylvain Auclair (sekretario), Pierre Pouliot-Lavoie (kasisto), Yevgeniya Amis (konsilanto).

Limdato por la venonta eldono /

Échéance pour le prochain numéro : 2011.8.20

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à **riverego(à)esperanto.qc.ca**

Montreala Esperanto-Domo (MEDO)
6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8

(Vidu retejon por vidi kiel atingi)

(Voir site web pour un plan d'accès)

Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo
Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement

La Riverego (*Le Fleuve*) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme: Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca).
Correction: Silvan Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE:** Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire), Pierre Pouliot-Lavoie (trésorier), Yevgeniya Amis (conseillère).

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8
info@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

Service de librairie postale à Montréal

La libroservo de KEA en Montrealo akceptas mendojn rete kaj letere. Konsultu la retejon por pliaj informoj.

Service de librairie postale à Montréal

Le service de librairie de KEA accepte les commandes par courriel et courrier. Consultez le catalogue en ligne.

www.esperanto.qc.ca/katalogo

Pasporta Servo 2011 !

Aliĝu tuj se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :

www.pasportaservo.org.

Vi povas ankaŭ kontakti Ĵenja Amis (yevgeniya_amis(ĉe)yahoo.com), kiu estas la peranto por Kanado.